Senprofita organizo KAMPARANA SOLIDARECO
Kalima, Maniema/RDKongo.
Av. Kamisuku II, Kvartalo Munyangi, Urbo: Kalima, Teritorio de Pangi, Provinco: Maniema/RD Kongo
Tel: +243 998735042, +243 998735649
Retadreso: pieadc2006@yahoo.fr
www.kamparanasolidareco.weebly.com

# I. RAPORTO PRI LA UTILIGO DE LA FINANCADO

1. Nomo de la projekto: **Trinkakva projekto**
   1. Konkretigho de la projekto
   2. Periodo : en la jaro 2015.
   3. Numero de la projekto: 4a/2015.
   4. Titolo de la projekto: Projekto por trinkakvo aliro en Kalima urbo/Maniema Provinco/RD Kongo.
   5. Loko: En la kvartalo CAMP PLESSY kaj CAMP FAMILLE
   6. Organizajho kiu konkretigis la projekto: Kamparana Solidareco/PIEADC
   7. Kampuzo: Trinkakva aliro
   8. Kontrakto pri la financado: La subteno venis el: Stiching Voor Internationale Komunikatie, la Fonduso WKV. AG, asocio de Verduloj AVE, s-ino Betty kaj geesperantistoj tra la mondo.
   9. Monkvanto por la projekto: 11500 mil eùroj.
   10. Profitantoj de la projekto: Kalima enloghantoj ghenerale kaj chefe 2300 familioj chu 4200 homoj loghantaj en Camp Pless avenuo Toyota, Camp Famille Mapendo.
   11. Komenco de la projekto: La projekto komencis en la dato de 14an de Decembro 2015.
   12. Fino de la projekto: la projekto finighis la 29an de Januaro 2016.

## 2. Resumo pri la konkretigo de la projekto.

Por solvi la trinkakva problemo kiu trafas Kalima enloghantojn nia asocio Kamparana Solidareco/ PIEADC initiatis antaù tri jaroj akvan projekton. Tiuchi estas la tria shtupo kaj kostis 11500eùroj.

La nura shtupo kiu jhus havigis Camp Plessy kaj Camp Famille puran akvon, venas post la unua shtupo kiu celis akvaliradon en la ghenerala hospitalo de Kalima en 2013, la dua servis la enloghantojn de Camp Central.

Dank'al tiu tria shtupo 4200 enloghantoj de Kalima Centro nun havas akvaliradon konstanta maniere.

Kompreneble, la bezonantoj estas multe char nur dek procentoj de enloghantoj havas aliron al la pura akvo.

La financado(11500mil eùroj) helpis por la acheto materialoj: plastajn tuboj, sakoj da cementoj, shtonero, genutuboj, pago de la manlaboro, ktp.

La akvo estis kaptita en la sama akvujo STACIO OMARI CHAMI kaj transportita per tuboj de du coloj kaj unu colo. La transporto de la akvo ghis la Camp Plessy estis 1002 metroj.

La laboro komencis la 14an de Decembro 2015 kaj finighis la 29an de Januaro 2016 chu unu monato kaj duono. Okazis ankaù riparojn de kelkajn lokojn.

La materialoj venis el Goma, Nordo Kivu provinco kaj per aùto kaj aviadilo.

## 3. Teknika laboro

Kamparana Solidareco kontraktis kun plumbisto kaj masonisto chiu havis du asistantojn.

La volontuloj de Kamparana Solidareco pro la jarfinaj festtagoj, petis iom da monon por nutri la familiojn. Aliaj profitis de la monero por pagi la lernejajn kotizoj.

**4. Rezultoj**

Du kranaroj estis konstruiitaj kaj en du malsamaj lokoj. Unufoje, Kamparana Solidareco/PIEADC celis nur Camp Plessy sed la enloghantoj de Camp Famille petis al Kamparana Solidareco konstruis kranareton kun du kranoj kies oni nomis «Kranaro ANS, la vidvino» dum la chefa kranaro de Camp Plessy kun kvar kranoj nomighas «Kranaro HANS BAKKER». La enloghantoj de Camp Famille kiu cherpis la akvon en la Kranaro BETTY nun sendepende cherpas en ilia propra kranaro. Du komitatoj por la bontenado estis firme starigitaj.

Temas pri la 5-membra komitato de la Kranaro HANS BAKKER( Camp Plessy).

s-ro MUTUZA MUSAFIRI Paul Prezidanto

s-ino BINIGWA MAWAZO kasistino

s-ro KIBWE MINONO konsilanto

s-ro KIKA GEDEON konsilanto

s-ino Victorien ELENGA konsilantino

**Kranaro ANS BAKKER (** Camp Famille )

s-ro Lazare NGUMBI Prezidanto

s-ino MUSEME NGALYA Kasistino

s-ro KIBISWA AMISI Konsilanto

s-ro NGABO KALALA konsilanto

s-ro KULYANZOGU IBONGA konsilanto

**5. Renkontitaj Malhelpoj**

Naù dek procentoj de Kalima enloghantoj alfrontas la trinkvan problemon. Tamen la konstruo de tri kranaroj en Kalima solvetas la problemon. Dum la batalo devas daùre okazi por ke, la tuta urbeto havu aliron al pura akvo.

La transporto de materialoj komplikighis pro la malbona stato de stratoj dum la plusezono. Ankaù estis lokoj ripari por ke, la akvo fluu senmahelpe.

La grava malhelpo estas ke, la akvujo(fonto) kie ni kaptas la akvon ne plupovas servi alian kranaron. Do, ni devas turnighi en alia loko. Temas pri la rivero ABUKI kiun, vi vidos en la fotoj.

Alia malhelpo estas labori dum la pluvsezono.

**II. FINANCA RAPORTO**

Mono ricevita: 11500 Euroj

| Numero | Destino | Kosto euro | Sume euro |
|---|---|---|---|
| 1 | Materialoj(Plastaj tuboj, genutuboj, niploj, gluajho, kranoj, ktp )<br>Trasporto de materialoj en Goma ghis che la transporto agentejo | 7005<br>84 | |
| 2 | Materialoj por la masonado( Brikoj, sablo, cemento, ) | 1080 | |
| 3 | Transporto de materialojn Goma-Kalima-Kalima | 1350 | |
| 4 | Manlaboradon Plumbisto<br>Manlaboro Mosonisto | 500<br>600 | |
| 5 | Motivado de volontuloj | 400 | |
| 6 | Sanoficejo | 80 | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 7 | Komunikado(Intereto kaj telefono) | 50 | |
| 8 | Motivado de la administranto de la projekto | 350 | |
| 9 | Sume<br>Saldo: | 11499<br>1 | **11499**<br>**11500** |

### III. KONKLUDO

La tria shtupo de la akva projekto  pluiris sukcese. Kamparana Solidareco/PIEADC sincere dankas la kontribuintojn: Stiching Voor Internationale Komunikatie, la Fonduso WKV. AG,  Asocio de Verduloj AVE, s-ro Jungkee LEE kaj sia religio, s-ino Betty  kaj la tuta Esperantaro.

Kalima enloghantoj  sopiras al via plua subteno esperante ke, chishtupo kiu okazus en 2016 estos grandega. Kaj via vico turnighos al organizoj, fondusoj  monpetante por ke, gravan aferon okazu.

Memore al Hans BAKKER, Kampana Solidareco/PIEADC nomis unu el la kranaro Hans BAKKER kaj la alia ANS, la vidvino.

### IV. SUGESTOJ

Al chiuj subtenintoj, parteneroj kiuj ne subtenas Solidareco Kamparana/PIEADC kaj vi kiuj ne konatighis kun ni, laù nia plano, la jaro 2016 estas grava jaro de nia akva projekto. La celo estas kovri Kalima centro je pura akvo.

Kamparana Solidareco/PIEADC volas kapti la akvon el la rivero «ABUKI» kiu situas je kvin 5km de loghejoj. Chikaze devas fari digegon kaj transporti la akvon per  tuboj de 140 diametroj.

Siatempe Kamparana Solidareco/PIEADC faris projekton kiu kostis 250000eùroj.

Kamparana Solidareco/PIEADC petas al la bonfarantoj, se ili daùre subtenos, peni por havigi la financojn en Junio. Char seka sezono faciligos la transporton de materialoj kaj la laboro pluiros bonege.

Por Kamparana Solidareco/PIEADC,

Etienne KATCHELEWA KANDOLO, Prezidanto.

Pliaj informoj sur la retejoj de : : Betty Chatterjee: http://rosejo.blogspot.de/

AVE, Verduloj Esperantistaj: www.verduloj.org/afriko.htm





Kalima-3, 4 kranoj „Hans Bakker“




Kalima-3, 2 kranoj „Ans Bakker“




Komitato kranaro "Hans Bakker"




Komitato kranaro "Ans"



2 cola




Roka subgrundo